

BELGA ESPERANTISTO

48a Jaro — N-ro 7a — Septembro-Oktobro 1956a

Fondita
en 1908a



Abonprezo:
Fr. 100,-

Redaktoro-Administranto:
la Prezidanto de R.B.L.E.:

Maur. JAUMOTTE

Avenuo De Bruyn, 44
Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,
aliĝanta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

La Karaktero de Esperanto

Sub la titolo „Niaj amikoj skribas” aperis en la antaŭa numero de B.E. traduko de artikolo de la konata Nederlanda verkisto Jan Greshoff. La aŭtoro, kvankam ne Esperantisto, tre klare vidas la esencon de la ekzistado de Internacia Lingvo, kaj li meritas nian admiron, ke li sukcesas tiel fundamente kaj elokvente esprimi sian opinion pri tio. Malgraŭ tio mi ŝatus fari kelkajn rimarkojn; estante jam multjara Esperantisto, mi ja povas fronti liajn vidpunktojn kun la praktiko.

Unue ni mallonge reprenu la fadecon de la rezonado.

„La lingvo estas la tuta popolo”, ĝi spiras la historion, la kulturon kaj teknikan nivelon de la popolo. Ĉiu kiu uzas alian lingvon ol sian propran, enspiras la spiriton de tiu popolo. La deviga uzo de alia lingvo, ankaŭ en la kazo de dulingvismo, samtempe devigas enspiri tiun nacian spiriton. Jen la nejustaĵo: *deviga* enspiro de alinacia spirito estas netolerebla al la spirita libereco kaj elvokas reziston. Nur kiam ĝi estas libervola, ĝi estas pliofte eĉ aŭde, akceptata.

Kontraŭe artefarita lingvo, ne ŝarĝita de nacia spirito, estas akceptebla al ĉiu.

Ĝis tie ĉi la aŭtoro.

Ni nun konsideru kelkajn aspektojn de pli proksime.

Ĝis nun la disvastiĝo de lingvoj iris laŭ „natura” vojo. Tio signifas ke ili

gajnis terenon, perdis ĝin aŭ eĉ malaperis laŭ proceso ne diktita de inteligenta elekto. La determinaj faktoroj estas:

1. Natura kresko aŭ malkresko de popoloj. Tiel la indianaj kaj aŭstralianaj lingvoj iom post iom malaperas.

2. Milita subpremo.

3. Ekonomia influo. Pensu pri la franca lingvo en Bruselo, de la angla en Johannesburg, ankaŭ pri la malapero de dialektoj kaj malgrandaj lingvoinsuloj en grandaj lingvoteritorioj.

4. Migrado. Landoj kiaj Usono, Kanado, Sudameriko, Aŭstralio, akceptas milionojn da enmigrintoj, kiuj post unu generacio alprenas la tiulandanan lingvon.

Alispeca disvastiĝo de lingvo konsistas en la poloma penetro en aliajn lingvojn, pere de kultura kaj teknika influado. La itala lingvo donis multajn muzikajn terminojn, la angla donis amason da terminoj sur kampo de sportoj kaj tekniko. Alia grava penetro okazas pere de filmo kaj kantoj (ŝlageroj).

Ĉu iam artefarita lingvo havos seriozan ŝancon esti egalvalore uzata en la internacia trafiko? Ĉu iam la natura proceso de lingvo-evoluo estos trarompita kaj anstataŭata de konscia inteligenta elekto?

(daŭrigo p. 62)

Ĉu vi volas gajni la Milionon?

Dank' al la anonce kunlaborado de diversaj gravaj komercaj societoj la eldonejo „MONDO” intencas eldoni, - ekde la proksima monato -, monatan gazetforman revuon, kiu propagandos Esperanton; kiu enhavos, en ĉiu numero, tutan lecionon kaj kiu estos disdonata en ĉiuj leterkestoj de diversaj regionoj de la lando kaj, iom post iom, de tuta Belgio.

Ne necesas, ke ni substreku la gravecon de tia entrepreno, por la disvastigo de nia lingvo en nia lando. Ĝi estas evidenta!

Sed la eldonistoj havas pli vastajn planojn. Ili samtempe volas organizi grandajn senpagajn konkursojn por la abonantoj de tiu gazeto, kiuj povos gajni premiojn, por entute

UNU MILIONO DA FRANKOJ !

Esperantistoj kaj ne-esperantistoj, - kiuj lastaj cetere facile povas lerni la lingvon, trastudante ĉiunmonate la lecionon kiu aperos en la revuo -, rajtas partopreni al tiu giganta konkurso.

La abonprezo al la revuo estas Fr. 25. — por la tuta jaro. Oni povas sendi sian pagon al P.C. 890.81 de la Eldonejo „Mondo”, Brasschaat (apud Antverpeno).

Kaj niaj membroj kaj legantoj povas kaj devus, ne nur sendi sian propran abonprezon, sed fari propagandon por ke ankaŭ multaj eksterstarantoj partoprenu la konkurson.

La sperto montras, ke multaj homoj serĉadas regule okazajn por partopreni al konkursoj iaj ajn, kiuj povas havigi al ili premiojn.

Nu: Ni ĉiuj kunhelpu por ke multaj partoprenantoj sin anoncu por tiu ĉi kaj tiel sukcesigu la grandan entreprenon de niaj amikoj.

La Nova Estraro de U.E.A.

En la Universala Kongreso de U.E.A. en Kopenhago estis elektata nova estraro, kiu konsistas nun el jenaj personoj:

Prez. Prof. D-ro G. Canuto, Italujo.

Vic. Prez. S-ro P. M. Mabesoone

Nederlando

Vic. Prez. S-ro H. Holmes, Britujo

Gen. Sekr. Prof. D-ro I. Lapenna.

Membroj D-ro Ing. G. Azzi, Italujo.

S-ro R. Llech Walter, Francujo

D-ro W. Herrmann, Germanujo.

Ĉiuj al Eindhoven en 1957

Laŭ sciigo de S-ro A. W. Withoos, Sekr. de la L.K.K., Viottastr. 11, Eindhoven okazos en 1957 la

BENELUKSA ESPERANTO-KONGRESO

en la lumurbo EINDHOVEN, Nederlando.

Pliaj informoj sekvas en venontaj numeroj.

Rakonto

FATALAJ OKULVITROJ

Gaja utopia rakonto de Pietro Bisvan

Per plena voĉpovo Cladgett, karnobulo en pompa fotelo esprimas sian indignon:

„Bankon mi gvidas, ne filantropan klubon. Ni ne zorgas pri knabetoj kaj iliaj revoj!”

La mizera junulo kun nomo Bookström antaŭ li donis la ŝuldtan sumon kaj eliris senespere. Restis nur dek dolaroj. Li ja devos ĉesi medicinstudon kaj akcepti la proponitan profesorecon de aplikata matematiko.

En filmoj kaj romanoj homon kiel Cladgett certe trafus briko de ruina domo aŭ ŝuldanto lin venenmortigus. Sed Cladgett male pli kaj pli prosperis kaj grasiĝis. Kaj li ŝajnis pli sekura ol la Roko de Gibraltaro.

Nur post dekkvin jaroj lin atingis la mano de l' sorto en formo de apendicito. Vespere li kriis pro doloro kaj mortotimo kaj malbenis la kuraciston kvazaŭ kulpus tiu.

D-ro Banza nenion diris, nur palpis la abdomenon, prenis sangoguton de la fingropinto en glaseton kaj eliris. Post horo, longa horo, li revenis. Cladgett ŝajnis legi mortkondamnon en la vizaĝo de la kuracisto. „Operacio!” li ekĝemis kiel vipita bubo, „mi ne operaciigas, mortos mi...” kaj kvietiginte: „Aŭdu, mi devos ĉeesti gravan kunsidon tri tagojn de nun. Mil dolarojn, se mi estos sana.”

Banza skuis la ŝultrojn. Nur bone, ke oni ne povas aĉeti sanon! Penseme li aliris restoracion kiam li subite sentis amikan dorsobaton.

„Kio estas, Doktoro? Vi aspektas malbon humora.”

Estis Bookström, nia konato, kaj post la mango, Banza rakontis pri la ĉagreniga dilemo kun tiu obstinema Cladgett minacanta lian karieron.

Bookström sidis longan tempon trankvile pensante.

„Estas ĝuste tio, kion mi serĉis”, li fine diris. „Ĉu vi volas aŭdi lecionon, Doktoro?”

„Vi memoras, kiel mi forlasis medicinon? Tamen ankaŭ matematiko interesas. Ankaŭ ĉi-afere mi devas ĝin apliki.

„Vi aŭdas multon pri la kvara Dimensio. Ne supozu, ke mi eksciis, kio ĝi estas. Sed mi ĝin aplikas same kiel mi utiligas lumon aŭ graviton sen koni ilin. — Do, vi prenos viajn mil dolarojn kaj ricevos mil aliajn por mi...”

„Konsentite, sed kiel...?”

„Nu, mi devas doni ekzemplon por klarigi. Imagu, ke vi kaj tiu ulo Cladgett estas dudimensiaj estaĵoj vivan-

taj sur la sama ebena. La sola maniero por vi, elpreni lian apendicon estas: tranĉi truan en lin. Kompreninte ĝis nun? — Sed, pensu, ke iu profesoro de aplikata matematiko vin levas iom, nur iomete super la ebenon. Vi tiukaze povus elpreni la ĉagrenajn sen truo tra la cirkonferenco. Li, limigata sur la ebenon, nenion, vidos sed vi revenos apud lin, kun la apendico en via mano.”

„Brilanta argumentado, sed bedaŭrinde...”

„Ho, ĉu vi ne povas plupensi, ke mi konstruis lifton, kiu vin levas orte al la aliaj tri laŭlonge de la kvara dimensio? Mi tion faris: vi povas kuraci la malculon sen fari vundon en lin.”

D-ro Banza salte ekstaris. La homoj en la restoracio sin turnis.

„Venu kaj vidu!”

„Mi trovis specialiston”, la doktoro komencis, „kaj mi mem konvinkis ke post du tagoj enlite kaj diete vi estos sana. Bedaŭrinde... (paŭzo) li postulas mil dolarojn kaj insistas, ke ili estas pagendaĵ anticipe... kiel la miaj.”

Cladgett sin levis en la lito sed ĝeme refalis.

„Vi doktoroj estas bando de rabistoj” li lamentis.

Sed apendicito tro bone substrekas postulon. Kvin minutojn poste li jam estis survoje al la universitato kun varistino kaj la doktoro, kiu havis du ĉekojn en la poŝo.

Bookström jam atendis. Sur lignan tablon ili levis la ŝargon tute ne dolĉan. Apud ĝi staris la „lifto”, simpla kiel ĉuj inventaĵoj grandiozaj kaj geniaj. Estas tri kunsraŭbitaj latunaj reloj, unu orta al alia ĉiu kun cilindro kaj piŝto. Ĉe iu universala punkto kunvenis tri kurbaj stangoj, super kiuj firmiĝis platformo kun gumomato. Tio estis ĉio.

Kuŝante sur la malmola tablo, Cladgett povis aŭdi Bookström diri: „Kredeble vi ne insistas, mem fari ĝin. Mia ja ankoraŭ nun scias fortranĉi apendicon.” Sed la bankistan protestŝtormon sufokigis la kloroformmasko.

La profesoro isn starigis sur la gumomaton. Klik! Li estis for. Poste Cladgett ekĝemis kaj iom nenatura aŭdiĝis la voĉo de Bookström: „Silentu, azeno!” Apenaŭ la sveninta varistino reekkonsciĝis, kiam klik. tie li restaris kun la apendico ŝvelinta al la grandeco de dikfingro.

„Metu ĝin en formalinon por montri al li, kiel malsana li estis.

Vekante lin la postan tagon, oni povis vidi, ke Cladgett fartas multe pli bone. La febro estis for kaj du tagojn poste li ĉeestis la direktor kunsidon grumbiante ke neniam li malsanis kaj malbenante la trompkuraciston.

Kaj Banza, kiu ne tuj sentis sin ofendita, ĉi tiam do iom ĉagrenis kaj decidis, ke antaŭ ol li lin vidos, la impertinentulo povos venigi afrikan sorĉiston. Sed li ja ne diferencis kun iu alia bona kuracisto kaj vokite, li estis „tiom azena” lin viziti.

Ĉi-foje Cladgett ne kuŝis en lito. En brakseĝo li frotis sian duonsferan abdomenon.

„Mi pensis min kuracita de apendicito”, li lamentis kaj la doktoro hipokrite respondis: „Do ĝi estis apendicito, ĉu ne?” Kaj li aldonis „Certe vi denove havas mallakson.”

Mallakso estas kutima diagnozo de doktoroj, kiuj ne volas serĉi la verajn kaŭzojn. Nur fine, per multaj gutoj da ŝvito, Cladgett lin petegante persvadis uzi radio-skopon. Banza restis en rivelejo nedifineblan tempon, ĝis li elvenis kun cinabre ruĝa kapo.

„Kio estas?” kriis la grasulo.

„Ĝagatelo. Ni veturu al profesoro Bookström kaj post minuto vi denove fartos bone.”

Sed li malbone konis Cladgett.

„Mi ne volas revidi tiun ĉarlatanon. La roentgenradian bildon vi donu aŭ foriru!”

D-ro Banza donis ĝin. Tie, precize videbla estis paro de senmodaj pinzetoj okulvitroj.

Terura timego ekkaptis la grasulon traversitan de stranga konvulsioj. Klakis supren kaj malsupren la makzelo, la vizaĝo irizis de mortopalo al viola bluo.

Banza ne malpli tima telefonis Bookström.

„Ho, kiel malfeliĉe. Mi venos!”

Ne kun la sama komplezo li estis akceptita. Cladgett ŝajnis kontentigi, rekante ĵeti la pezan seĝon.

„Nu, nu, dolora? Ni vidu la roentgenogramon!”

La profesoro alterne rigaris la ŝvelantan duonsferon kaj la okulvitrojn sur la foto kvazaŭ mirante, ke tia malgrandaĵo ne trovas lokon tie.

„Vi malpura ŝtelisto, vi fripono, ni pagu kvindek mil dolarojn aŭ mi vin akuzos pro kompenso aŭ mi vin...”

„Ne tiel rapide, kara sinjoro, se mi nur posedus centon mi volonte ilin donus.”

Bookström ridetante riverencis.

Kiel vulturoj la ĵurnaloj sin ĵetis super tiun kaptajo: Okulvitroj lasitaj en korpo post operacio, kiun plenumis dumnokte kaj sekrete ne lega kuracisto, sed pura komencanto. Kaj la kortumejo preskaŭ krevis pro amaso malsata je sensacioj.

Sed kiel la sagaca leganto jam kon-

Mia Vizito al Princino Beatrix

la 30-an de junio '56

Antaŭ du semajnoj iu el la ĉeestantoj de nia klubkunveno subite demandis al mi: „Ĉu ne estas bona ideo donaci Esperanto-lernolibron al la princino Beatrix, ĉar ŝi nun sukcese faris sian fin-ekzamenon?”

Mi pripensis pri tiu demando kun iom da dubo pri la ideo, ĉar mi estis konvinkita, ke nia reĝidino baldaŭ estos tute okupata per nova laboro dum sia estonta studenta tempo. Kaj krom tio nura lernolibro ŝajnis al mi ne sufiĉe taŭga kaj bela kiel donaco. Sed la ideo en si mem estis bona kaj instigis min al nova ideo!

Ĉar post kelkaj tagoj mi legis la sciigon en la ĵurnalo, ke nia reĝidino Beatrix vizitos Amsterdam por post sia fin-ekzameno de la mezgrada lernejo veni en kontakton kun la nederlanda popolo, kaj tiam mi subite pensis: „Tio

kludis, la skandalo ne okazis. Cladgett ne gajnis kompencon, sed kontraŭe, li jam estis perdinta kvindek funtojn kaj nur aspektis kiel mizera ombro de si mem. Fine li frapis la pordon de Bookström kiel povra pekulo:

„Postulu, mi pagos,” li spirĝemis tio sonis kiel g-r-rump, r-r-rump.

„Sed mi decidis ke vi mortacu!” Tamen Bookström estis ja homo kaj submetis la rimarkindan proponon:

„Mia kara, vi establos fondajon, el kiu malriĉaj, indaj studentoj ricevos sumon poste repagoton. Mi memoras, ke iam vi parolis pri kvindek-mil dolaroj. Dolaroj aŭ doloroj, ĉu ne? Cetere operacio estus pli malkara.”

La vorto „operacio” decidis. —

Tiun fojon D-ro Banza mem volis fari la laboron kaj ĵeti rigardon en la transcendon. Kiam li reaperis li estis ravita.

„Ĉu vi povas imagi,” sorĉite li spiris, „stari en la centro de imensa sfero kaj vidi subite ĉiujn organojn ĉirkaŭ vi. Super mi la intestoj, dekstre la lieno kun la okulvitroj apude, maldekstre la hepato kaj sub miaj piedoj la peritoneo. Sed estis iom malhele. Mi ne povis ĝin elteni, kvankam mi volis restadi longan tempon en li. —

„Tamen vi ne estis en li.”

„Sed jes, mi ĵus diris. Mi estis en li kun la stomako antaŭ mi, la veziko post mi. En li mi estis.”

„Ja ŝajnis al vi tia. Sed viru; se vi estus dudimensia kaj meze de ĉi tiu cirklo, estus malfacile vin konvinki, ke mi ne estas interne de la cirklo.”

Ekspozicia Materialo

Ĉiuj ricevis, - sed pro la libertempa periodo eble nur malmultaj legis -, nian alvokon en antaŭa numero de nia revuo, rilate al kunlaboro por la organizo de ekspozicia materialo, kiun la Antverpena Grupo „La Verda Stelo” volas krei, okaze de sia jubileo.

Nun la tempo jam urĝas: Tial rekta peto iras al la diversaj grupoj, por ke ili dediĉu parton de almenaŭ unu el la tuj sekvantaj semajnaj kunsidoj, al alvoko, ripenso kaj priparolo de tiu plano.

Ni esperas baldaŭ ricevi projektojn por multaj paneloj, inter kiuj estos elektataj tiuj, kiuj estos, unuavice, realigataj por la premita Ekspozicio.

Ĉio estas sendota al la adreso: De Bruynlaan 44, Wilrijk.

de mia oficejo desegnis belan „dediĉon” sur la unua paĝo de la libro en la naciaj koloroj, ruĝa, blanka, blua, kun verdaj Esperanto-steloj... kaj mi povis vidi ke tio tre plaĉis al ŝi.

Fotografistoj faris fotografaĵojn dum ke Beatrix kaj mi kune rigardis en la libro, kaj mi havis la okazon multe rakonti pri Esperanto. Pri la petskribo al la „Unuigintaj Nacioj” subskribita de 15.000.000 personoj, pri la lecionoj de Mag. Pragano en la universitato, pri la simpla gramatiko kun reguloj sen esceptoj, pri la finajoj, o, a kaj e, pri la prefikso, „mal”, k.t.p. k.t.p.

Ĉiu aŭskultis kun granda atento. Tiam la urbestro diris: „Kio estas „Ĉerizoj” en Esperanto?” Ni do mango „ĉerizojn” en la ĝardeno. Kaj tion ni faris. Ni ĉiuj iris en la belegan ĝardenon kun multaj floroj kaj lagetoj.

Mangante ĉerizojn en la brila sunlumo, ni babilis kun Beatrix pri ŝia vojaĝo al Romo kaj intertempe oni faris multajn fotografaĵojn kaj ankaŭ filmis. Ni aŭskultis belan flutkoncerton en la freŝa aero. Post tio ni trinkis kafon en la ĝardeno kaj tiam venis la tempo por la foriro de Beatrix kaj la invititoj al la sportejoj. Mi metis mian subskribon en la gastoj-libro, kaj dankis kaj adiaŭis la eminentulojn.

F-ino v. d. Beek.

Novarangita broŝuro pri LUND

La sudsveda, universitata urbo Lund eldonis novarangitan broŝureton en Esperanto menciante la historion kaj la vidindaĵojn de la urbo. Kontraŭ 1 respondkupono oni povas ricevi ĝin ĉe Drätselkammaren, LUND, Svedujo.

BELGA KRONIKO

Prezidanto: S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44, Wiirijk.
 Viceprezidanto-Kasisto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.
 Viceprezidantino: S-ino J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.
 Generala Sekretario: S-ro H. Sielens, „Internacia Marista Domo“, Falcon-
 rui, 21, Antverpeno.
 (Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 13.37.67)

Ora Jubileo

Semajnfino por 250 Frankoj!

La Reĝa Esperanto-Grupo de Antverpeno „La Verda Stelo“ festos, en januaro proksima, sian ORAN JUBILEON.

Tiu ĉi Grupo jam solene festis siajn 20jaran kaj 25jaran jubileojn. Ĝi do certe volas festi sian 50an kaj speciala komitato jam kunmetiĝis, kiun prezidas la viceprezidanto S-ro H. Sielens.

Ĝi organizos semajnfinojn, la 19an kaj 20an de januaro proksima, al kiu ĝi invitas ne nur ĉiujn siajn proprajn gemembrojn, sed ankaŭ ĉiujn multnombrajn geamikojn, kiujn ĝi havas en multaj urboj de Belĝio.

La partoprenrajto al ĉiuj aranĝoj estas fiksita je Fr. 50 por la ordinaj kaj Fr. 25 por la familiaj membroj: edzino kaj infanoj.

Riĉa festeno kostos, - enkalkulitaj la trinkaĵoj -, Fr. 150; sed la Grupo tamen malpli altigos tiun ĉi prezon ĝis Fr. 125 por ĉiuj aliĝintoj al la festoj, ĝis la 1a de decembro.

Aliflanke kaj por ebligi multnombrian ĉeeston de eksterantverpenaj partoprenantoj, la Grupo decidis ebligi al ili la partoprenon al la tuta programo, - enkalkulita la tranoktado en Antverpeno de sabato ĝis dimanĉo -, por la prezo de Fr. 250.

Tio estas, - en la nunaj cirkonstancoj -, vere tre malalta prezo, sed la Grupo komprenis, ke ĝi devas ion fari por plifaciligi la partoprenon de tiuj, kiuj havas tamen ankoraŭ, pro la al- kaj forveturo, aliajn gravajn elspezojn.

Ĝi demandas nur ke tiuj, kiuj intencas partopreni kaj profiti tiujn ĉi favorajn kondiĉojn, sin anoncu sufiĉe frue por ke ĉio povu esti aranĝata laŭ plej bona maniero.

La definitivan programon ni ne jam enpresas, sed ni povas tamen jam diri, ke la sabataj posttagmezo kaj vespero alportos al ni: interkonatigan horon kun vizito al ekspozicio; teatron kaj kabaretan prezentadon kaj dancadon; la dimanĉo: festkunsidon kun honorigo de la jubileantoj; oficialan akcepton en la Urbdomo; jubilean festenon kaj agrablan kuneston por daŭrigi kaj fini.

Pagoj povas esti farataj ekde nun, al la poŝtĉekkonto No 726.54 de „La Verda Stelo“, Deurne-Antverpeno.

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo „La Verda Stelo“

(Poŝtĉeknumero: 726.54)

La 6an de julio la parolata ĵurnalo havis la kutiman sukceson al kiu ankaŭ jam kunlaboris nova membro S-ro L. De Marré.

La 13an S-ino F. van den Neste brile gvidis amuzan vesperon kaj vekis gajan atmosferon per la diversaj premioj kiujn ŝi donacis. Longa aplaŭdo estis la rekompenco por la organizantino kaj ankaŭ por S-ro J. Verstraeten kiu helpis.

La 20an, S-ro R. Balleux paroladis pri „Mia vojaĝo en Suda Svisujo“ kaj, helpata de multaj lumbildoj, li bonege skizis la vivon de la enloĝantoj, la paceman atmosferon kiu tie regas kaj la grandiozecon de la naturo en tiu bela lando. Per trafaj vortoj S-ro J. Verstraeten dankis.

La 27an, oni laŭvoĉe legis artikolojn, kiuj aperis en la „Rondira Gazeto.“

La 3an de aŭgusto, denove okazis la parolata ĵurnalo al kiu S-ro J. Verstraeten, per lumbildoj pri la okazintaĵoj de la pasinta monato, donis apartan atmosferon.

La 10an S-ro R. Balleux gvidis amuzan vesperon kiu plene sukcesis pro la diversaj allogaj numeroj.

La 17an ne okazis kunveno pro la Antverpena kermeso kaj la 24an S-ro Roger Jaumotte faris paroladon kun lumbildoj pri „Kopenhago“ kaj enkondukis per trafaj klarigoj la raportistojn de tiu vespero. S-ino L. Bernaerts, laŭ sia amuza maniero, kaj S-ro R. Van Eynde, tre detale kaj akurate raportis pri la Universala Kongreso en Kopenhago (unua parto).

La 31an la Prezidanto S-ro Maur. Jaumotte jam enkondukis la vintran sezonon

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16

ANTVERPENO

— Por via MUZIKO
 RADIO kaj GRAMOFONO

per rimarkinda parolado pri „Mia vojaĝo al Vieno“, parolado kiu estis tiel ampleksa kaj detala ke ĝi estis daŭrigata la 7an de septembro. La paroladisto, kiu, akompanata de sia edzino, faris la vojaĝon aŭtomobile, skizis, loko post loko, la diversajn vidindaĵojn kaj per sia konata bonhumoro rakontis la multajn anekdotojn, kiujn ili spertis kaj travivis dumvoje. La amaso da lumbildoj ankoraŭ pliagrablis la vesperon S-ro J. Verstraeten esprimis ĉies dankon. Per varma aplaŭdo la publiko agnoskis.

Programo de la venontaj kunsidoj:

Ĉiuvendrede en „Witte Leeuw“, Frankrijklei 4, je la 20.30a h. (la etaĝo).

Septembro: Dimanĉo, la 30an: solena vizito al la tombo de S-ino H. SCHOOFES: kunveno je la 15a h. ĉe la enirejo de „Schoonselhof“ (terminus tramo 24).

Oktobro: la 5an: Parolata ĵurnalo: la 12an: Mitulvespero en Billard-Palace Koningin Astridplein, je la 19.30a h.; la 19an: Libertempaj raportoj; la 26an: Kabareta Vespero.

Novembro: la 2an: E.K.I. vespero, parolado kun lumbildoj kaj kolorita filmo pri „Kongolando“ de S-ro F. Van Dooren: la 9an: Amuza vespero gvidota de F-ino H. Hofkens; la 16an: Parolado de S-ro A. Vercruyssen pri „Honorigaj distingoj Belgaj kaj Kongolandaj.“

FAMILIA VIVO:

Naskiĝo: En la juna familio H. Jacques-De Ketelaere naskiĝis unua filineto „Gerda“. Al la feliĉegaj novaj gepatroj Hugo kaj Henry, ni esprimas niajn plej korajn gratulojn kaj bondezirojn same kiel al la avo, nia malnova kaj fidela, S-ro Morris De Ketelaere.

Edziniĝo: F-ino Rosine Vanistendael edziniĝis la 18an de aŭgusto. Al S-roj De Soete-Vanistendael ni prezentas niajn plej korajn gratulojn.

Funebro: Plej sincerajn kondolencojn ni prezentas al la familio Toussaint, pro la morto de nia samideano Aug Toussaint

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°

LA LOUVIERE

S.P.R.L.

Tel. n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabuloj; KATOKULO, por signalvitroj.

kaj speciale al niaj bonaj gemembroj S-ino Genia Thibaut-Toussaint kaj ŝiaj infanoj kaj al S-ino Lea Bernaerts-Toussaint.

Same sinceraj kondolencoj iras al G-roj De Backer, pro la morto de ilia kara bo-patro kaj patro.

BRUGO

Bruga Grupo Esperantista

(Poŝtĉeknumero: 4835.33)

Dum la muzika vespero de la 10a de julio, S-ro Karlo Poupeye aŭdigis kaj komentariis kelkajn nuntempajn diskojn.

La 17an de julio, okazis ekzameno pri legado, post kiu S-ro Rob. Lagast prezentis tradukitan tekston pri Bruĝo.

Skriba ekzameno okazis la 24an. La tuj sekvanta kunveno estis ĉeestata de eksterordinare granda nombro da gemembroj al kiuj aldoniĝis ankoraŭ tri germanaj gesamideanoj: S-ro K. Simon, del. U.E.A. el München kun edzino kaj filo, alkondukitaj de Ges-roj. De Baets-Huyghe. En la kadro de la laŭprograma parolata gazeto, la parolinto estis donata al F-ino Is. Van Parys, kasistino, kiu sentoplene antaŭlegis salutparoladon al S-ro Ch. Poupeye, okaze de lia jam dekjara prezidanteco de la grupo. Je la fino de tiu alparolado, S-ino S. Verbeke-Vandenberghe, viceprezidantino, donace proponis al la prezidanto, nome de ĉiuj grupanoj, bonegan fontplumon kaj praktikan paperujeton, dum F-ino Verraes prezentis al S-ino Poupeye belegan florkorbon. S-ro Poupeye esprimis sian surprizon pri tiu neatendita honorigo kaj dankis nome de sia edzino kaj en sia propra nomo. Li akcentis ke, se vere, li sukcesis restarigi la grupon post la milito kaj gvidi ĝin de jaro al jaro al pli belaj sukcesoj, li ŝuldas tion grandparte al la fideleco, al la kunlaboremo kaj al la simpatio de la membroj, sentoj kiuj estas por li la plej valora rekompenco. Fotografajoj estis farataj, kiuj rememorigos pri la plej agrabla atmosfero de tiu notinda vespero.

Artikoloj el „Belga Esperantisto“ estis laŭlegataj kaj klarigataj dum la kunveno de la 31a, post kio kelkaj humorajoj estis rakontataj de S-ino Poupeye kaj de S-roj. Clauwaert kaj Van Hecke.

En la kunveno de la 7a de aŭgusto, F-ino G. Wijbouw interesiĝis raportis pri sia vojaĝo al Germanujo kaj Aŭstrujo, kie ŝi loĝis en esperantista junulargastejo „Frataro“ en Landeck. Ankaŭ S-roj Rob. La-

gast kaj René Van Cleven donis kelkajn unuajn impresojn pri sia kuna vojaĝo al Norda Germanujo kaj S-ro Raoul Behaeghel ankaŭ estis intervjuata pri sia vojaĝo al Italujo.

La 14an ne okazis kunveno pro la mezlibertempa periodo.

Escepte, la kunveno de la 21a okazis en la grupa sidejo „Cornet d'Or“; S-ro Rob. Van Cleven rakontis kelkajn travivaĵojn el sia dua libertempa vojaĝo, tiun ĉi fojon al Suda Germanujo kaj Aŭstrujo ĝis Brennerpas.

La 23an, denove en la provizora kunvenejo „Concordia“ humorajoj estis prezentataj de S-roj Lagast, Behaeghel, Ch. kaj Karlo Poupeye.

Programo de la venontaj kunvenoj:

Du novaj kursoj:

1e ĉiulunde, je la 8a vespere, en la KOMUNUMA LERNEJO de SINT-MICHIELS:

Nova elementa kurso gvidata de S-ro Rob. Lagast, helpa sekretario de la grupo.

2e ĉiumarde, je la 8a vespere, en la grupa sidejo „Gouden Hoorn — CORNET D'OR“ placo Simon Stevin 2, Bruĝo (Tel. 314.59):

Nova elementa kurso gvidata de la prezidanto, S-ro Ch. Poupeye.

La grupaj kunvenoj okazos, tuj post ĉiu leciono kaj regule en la sidejo, laŭ ĉi suba programo:

Septembro: la 18an: Interkonatiĝo inter la novaj lernantoj kaj la aliaj membroj; la 25an: Portretludado.

Oktobro: la 2an: Muzika vespero kun komentario (F-ino Y. Poupeye); la 9an: Legado de B.E. Lastaj aranĝoj por la balo; la 13an: (sabato) je la 21a en „Concordia“ Unua vintra balo kun la fama orkestro „Les Ambassadeurs“; la 16an: Raportado pri la balo; la 23an: Kanta vespero; la 30an: Letervespero.

BRUSELO

Esperantista Brusela Grupo

(Poŝtĉeknumero 123048)

La 2an de julio okazis parolata ĵurnalo. S-ro Vanderstempel gajnis la plej grandan nombron da poentoj per legado pri „La

Nia Dekanino
S-ino Félicie Staes mortis

Nia „panjo“! Ĉu eble! Ŝi ja estis 90-jara jam, sed restinta tiel vigla, tiel bonsana laŭŝajne, ke ĉiuj vidis en ŝi estontan jarcentulinon.

Ni nomis ŝin „panjo“ ĉar, el ĉiuj geanoj, ŝi estis la plej malnova, la plej fervora, la plej amata.

Nelacigebla pilgrimantino al kongresoj naciaj kaj internaciaj, la Beneluxan de tiu ĉi jaro ŝi ankoraŭ partoprenis, en Gento, kun entuziasmo de nove varbito.

La 30an de Junio, je kelkaj paŝoj de la ejo al kiu ŝi sin direktis, por ĉeesti la ĉiulundan kunvenon de la Esperantista Brusela Grupo, ŝi subite sentis sin malbonfarta. Je insista peto kaj akompane de niaj samideaninoj S-inoj Elly Staes, sia filino kaj Groverman, ties kuzino, ŝi reiris hejmen.....

Du tagojn poste, la 1an de Aŭgusto, iom post tagmezo, ŝi estingiĝis kviete, kiel lampo, kies oleo elĉerpiĝis.

Kaj premitaj ĉirkaŭ la lito kie ŝi kuŝis, pala sub la floroj, ni pensis, spite de nia ŝirita koro, ke ni tamen ŝuldis dankon al la sorto, kiu ŝparis al ŝi longan suferadon, kaj permesis tiun trafigon simblan, survoje al kunsido kun gesamideanoj, kvazaŭ ŝian lastan spiron ŝi estus volinta dediĉi al esperanto.

* * *

La enterigo okazis en intimeco. Krom ĉiuj lokaj esperantistoj kiuj sukcesis liberigi sin el privata deĵoro, ĝin ĉeestis S-ro G. Van den Bosche, direktoro de Belga Esperanto-Instituto kaj S-ino Lecat, reprezentanta la Antverpenan Grupon „La Verda Stelo“ kies prezidanto, nia Liga prezidanto, vojaĝanta en eksterlando, nur poste eksciis pri la funebro.

En krematorioje kaj tombejo, sinsekve D-ro Kempeneers, emerita prezidanto de R.B.L.E., kaj S-ro Jacobs, prezidanto de la Esperantista Brusela Grupo elvokis, per emociantaj vortoj, la noblan figuron de la mortintino.

Kara panjo!
 Vian korpon ni adiaŭis.

Sed ne vian spiriton.
 Neniam forgesos vin viaj multnombraj esperantistaj amikoj.

H. C.

Universo.”

La 9an, oni havis surprizan vesperon. Kutime, ni ne multe kantas, kaj tiun vesperon, ne nur kantigis nin, S-ro Vanderstempel, sed li instruis al ni, tre belajn kan-

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel.: 15.19.92

Entrepreno de

KONSTRUAĴOJ

tojn. Li mem faris vortojn sur konata muziko.

La 16an, perfektiga kurso. Ĉiam ni ek-aŭskultas tiun kurson kun kuriozeco, ĉar estas vera miksaĵo de serioza kaj agrabla temo. Tiun-ĉi fojon preskaŭ ĉiuj diskutis pri la uzado de kelkaj vortoj malbone interpretitaj. Kompreneble la Profesoro, S-ro Vanderstempel pravis. Bonhumore kaj kore li klarigis ĉion.

La 23an: Amuza vespero. La ludoj estis tre diversaj kaj la ĉeestantoj interbatalis por gajni, ĉu en grupo, ĉu individue la ludon, por esti rekompencataj per bonbonoj bongustaj. Ĉiuj ege amuziĝis. Je iu momento S-ro Claude Piron, rakontis al ni pri sia vojaĝo kaj laboro. Kaj anoncis sian foriron al New-Yorko je la 1a de aŭgusto.

(daŭrigo de p. 57)

Ni konstata ke la ideo de dulingvismo jam gajnis terenon, kaj, kiel Greshoff prave konkludas, nur artefarita lingvo estos akceptebla al la inteligente pensanta homo, kiu konscias pri la fakto, ke neneŭtrala dua lingvo iam forbalas aŭ almenaŭ grave difektus la propran lingvon. Sed kiom da homoj pensas tiel? Ĉu ni ne ĉiutage rimarkas ke la plimulto estas tute kontenta kun la natura proceso, kaj estus supozeble senproteste preta akcepti la anglan? Ĉu ni ne ĉiuj konas tiun seniluziigon ke ni pensas batali por memkompreneble bona ideo, kaj tamen devas konstati ke nia ĉirkaŭaĵo, anstataŭ entuziasme adheri, restas senmova?

Tamen, ni ne estu tro pesimismaj. Unue ni fidu je la praveco de nia koncepto. Ni konstata ke ĉiam pli penetras la ideoj de justeco (malgraŭ ĉio!) utileco, normigo, celtrafeco, efikeco. Esperanto respondas al tiuj postuloj! Ĝi do havas la ŝancojn!

Alia aspekto (ne konsiderita de Greshoff) de la uzado de Esperanto kiel dua lingvo estas la jena. Ni nomas Esperanton lingvo. Tio implikas ke ĝi, same kiel naciaj lingvoj, havas spiriton, la spiriton de la Esperanta „popolo“, pri kiu ni tiel volonte paro-

Bonan vojaĝon Claude kaj ĝis!

La 30an, pro profesia malhelpo de S-ro Jacobs, prezidis S-ro Vanderstempel. S-ro Castel gvidis debaton pri spiritismo. Kion opinii pri la spiritismaj fenomenoj? Ĉu ili estas science klarigeblaj? Ĉu ili evidencigas la ekziston de tiu „transmondo“, kiu restis ĝis nun ekster la atingopovo de la homa menso?

Partianoj de la du tezoj plej amike skermadis dum interesoplena interdiskutado en kiu vigle partoprenis nome, krom la suprecitaj prezidanto kaj gvidanto, S-ro Jacobs, F-rino Kestens, S-roj Swinne, Schoddiĵ kaj Schumacher.

La 6an aŭg. la kunveno estis dediĉata al la memoro de S-rino Félicie Staes-Vander-voorde. D-ro Kempeneers, honora prezidanto, kaj S-ro Jacobs, prezidanto de la E.B.G., relegis la adiaŭajn vortojn eldiritajn antaŭ la ĉerko de la kara grupa „panjo“. S-ro Castel, pro siaj amikaj rilatoj kun la mortinto, rakontis kelkajn memorarojn pli speciale ligitajn kun ŝia vivo privata, apenaŭ disigebla de ŝia esperanta. Emociplena vespero, kiun S-ro Vanderstempel finis per malrapida kaj mallaŭta ludado de „La Espero“. Tiun kunvenon ĉeestis jugoslava samideanino: F-rino Volvanovska, kiu diris kelkajn vortojn pri la promesplena stato de la movado en sia lando. Ankaŭ la grupo

las. Sekvas el tio ke la uzanto de Esperanto ankaŭ enspiras la spiriton de tiu popolo. Kio do estas tiu spirito, tiu karaktero? Ĝin difini ne estas facile; unualoke ni tamen devus meti, miaopinie, la „internan ideon“, same malfacile difinebla nocio.

Sed apud tio estas aliaj aspektoj: ni ne fermu la okulojn antaŭ la mankoj, kiuj (ankoraŭ) ekzistas. Ĝi nur malsufiĉe penetris en la fakan lingvon kaj pro tio ne posedas jam kontentigan fakterminaron kaj idiomon. Tiu kiu dubas rigardu foje ĉirkaŭ si kaj klopodu traduki la nomojn de simplaj objektoj el la ĉiutaga vivo, trafiko, varoj, partoj de maŝinoj, manipulado ktp. Dekoj, eble centoj da vortoj ne estas troveblaj en la vortaroj, kaj devas ankoraŭ trovi sian definitivan formon per internacia kontakto.

La nuna uzanto de Esperanto devas ĝin akcepti kun ĉiuj tiuj karakter-ecoj, ankaŭ la mankoj.

Estas tamen mia opinio ke en tio elstaras la „interna ideo“, kaj ke ĉiu kiu iam uzis ĝin en internacia socio, „trinkis“ iom da tiu „interna ideo“, kaj per tio, eble por la unua fojo en la vivo, komencis senti sin vera mondano. Nur tiu kiu mem spertis tion, scias la veran valoron.

dr W. J. Nijveld.

Korespondado

F-rino Delmestre Andreina, instruistino Via Duca D'Aosta 25 GORIZIA Italujo.

F-rino Marisa Arata, GENOVA Italujo Via Francesco Dassori 37.

S-ro Karel Vala OSTRAVA I Zahradni 1 Ĉeĥo-Slovakujo (15-jaraĝa studento).

S-ro Kiichiro Date, 106 Nishi 1 chome, Kitabatake Abeno-ku OSAKA Japanujo (30-jaraĝa asekura oficisto).

S-ro Vago Imre, instruisto en PECS, Rudas Lasztóutca 21 Hungarlando, serĉas kontakton per korespondado kaj interŝanĝo de desegnaĵoj kun nederlanda lernejo. Esp.geinstruistoj bonvolu skribi al la nomita adreso.

informiĝis pri alia funebro: mortis la patri-no de ĝia fidela anino S-rino Ernst, al kiu komuna kondolencletero estis sendata.

La 13an, okazis promenado al la lumigita parko Josaphat kaj sub gvidata de S-rino Stern... Oni estis kvar „gemuskedistoj“, kiuj kuraĝis eliri malgraŭ la nebula ĉielo! Sed kiuj estis tre kontentaj pri sed vespero.

Programo de la venontaj kunvenoj:

ĉiulunde je la 20a h. en „MIDI-BOURSE“ (la etaĝo), 35, rue de France (Suda Stacidomo), Tel. 22.46.29.

Oktobero: la 1an: Disdono de la Diplomoj de la Parolata ĵurnalo; la 8an: Vizito al la teatro de Toone, gvidota de S-ro SWINNE; la 15an: Perfektiga Kurso, gvidota de S-ro VANDERSTEMPEL; la 22an: Amuza Vespero, gvidota de S-rino WEYN; la 29an: Diskutvespero, gvidota de S-ro CASTEL.

Novembro: la 5an: Parolata ĵurnalo; la 12an: S-rino STERN: Kulpa aŭ senkulpa?; la 19an: S-ro VANDERSTEMPEL: Perfektiga Kurso; la 26an: S-rino WEYN: Amuza Vespero.

Por viaj esperantaĵoj, libroj, insignoj k. c.

Belga Esperanto-Instituto

26, Oostenstraat, 26 ANTVERPEN

kiu ankaŭ havigos al vi nacilingvajn librojn, revuojn kaj gazetojn, kaj ĉiuspecan skribmaterialon.

BIBLIOGRAFIO

JARLIBRO de U.E.A. 1956 unua parto aperis iom pli malfrue ol en la antaŭa jaro, sed la kaŭzo estis la transloĝigo de la Centra Oficejo de Londono al Rotterdam. La enhavo estas kiel en antaŭaj jaroj, kvankam estas kelkaj ŝanĝoj. Prof. Lapenna verkis antaŭparolon. La tuto aspektas bona kaj certe la aktivaj membroj trovos en ĝi valorajn sciindaĵojn.

* *

La SENPERA VERBIGO DE ADJEKTIVAJ de S-ro H. A. de Hoog, estas respreso de artikolserio en „Dia Regno“ 1955. Prezo gld. 0,60 inkluzive de sendkostoj. Mendebla ĉe la Libro-servo de KUNE, Druivenstr. 32 Hago, Nederlando kaj ĉe aliaj libroservoj.

Ni estas certaj ke ĉi tiu libreto 31 paĝaj trovos sian vojon inter la ge-esperantistoj. La estiĝon de la libro kaŭzis la deklaro de la prezidanto de la Akademio, S-ro Isbrucker en publika kunveno en la kongreso en Harle-mo 1954 kiam li diris, ke esperimoj kiel:

Li pravas; Tio sufiĉas; Nenecesas tion fari k.t.p. ne estas ĝustaj kaj en bona esperanto devas esti; Li estas prava Tio estas sufiĉa; Ne estas necesa tion fari; k.t.p. Nu S-ro de Hoog klare montris per ĉi tiu verkaĵo, ke la prez. de la Akademio suriris malĝustan vojon malaprobante la nomitajn esprimojn. En la fino de sia verketo S-ro de Hoog venas al jena konkludo:

La averto de S-ro Isbrucker estu do modifita jene:

1. La esperantistaro gardu sin kontraŭ senkritika uzado de ĉiam pli multaj verbigitaj adjektivoj.
2. Ĉi tiu fenomeno, kvankam esenca en la Esperanta vortformado, kaj jam amplekse praktikita de Zamenhof mem, meritas kaj bezonas trankvilan evoluon.
3. Imitemo kaj ludemo povus kaŭzi misevoluon en tiu fenomeno, kiu estas pli komplika ol ĝi ŝajnas ĉe unua vido.

* *

Por Nederlandanoj aperis ĉe la eldonisto J. Muusses, Purmerend, Nederlando, *Oefenboekje bij het Esperanto Leerboek* verkita de S-roj C. B. Zondervan kaj D-ro W. J. A. Manders. Prezo gld. 1.—.

Ĉi tiu libreto celas doni ekzercomaterialon por tiuj kiuj preparas sin por la elementa ekzameno kaj tial la verkistoj aldonis ankaŭ kelkajn taskojn de antaŭaj ekzamenoj. Certe ĝi estos bone akceptata de la gestudentoj.

Ĉe la sama eldonisto aperis ankaŭ la eldono de la libreto „Laborilo I“ apartenanta al la internacia lernoli-

bro „Sub la verda Standardo“ la konata rekta metodo por esperanto-instruo al infanoj verkita de S-ro P. Korte, Lernejestro.

Ke jam necesis 4a eldono parolos por si mem. Prezo de la libreto estas gld. 1.—. Havebla ĉe la Libro-Servoj.

* *

EL KTITAJ PRELEGOJ estas la titolo de libro en kiu estas kolektitaj diversaj gravaj prelegoj faritaj en la Someraĵ Universitato 1949—1954. Prezo gld. 3,90; \$ 1,10. Eldonisto J. Muusses, Purmerend, Nederlando.

Ni povas forte rekomendi ĉi tiun eldonon, kies enhavo estas tre varia kaj ampleksas 6 prelegojn rilatantajn al sociaj sciencoj kaj 6 kiuj koncernas la naturajn sciencojn. La prelegoj aperis unue en Scienca Revuo kaj estis tre bona ideo aperigi ilin nun ankaŭ en libroformo formanta tiel la duan volumon de Someraĵ Universitataj prelegoj. La unua volumo enhavas tiujn kiuj okazis en la S.U. en Malmö en 1948. Por ke ankaŭ estonte la eldono de tiaj prelegoj estu garantiata estas necese ke la esperantista publiko montras sian interesiĝon aĉetante la jam nun aperintajn.

* *

GEOGRAFIA REVUO estas eldonaĵo de Internacia Geografia Asocio, kiu estas fondita la 3an de aŭgusto 1955, dum la internacia kongreso en Bologna.

La 1a numero de ĉi tiu revuo aspektas tre bela kaj bona, riĉe ilustrita kaj kun enhavo tre varia kaj interese. Redaktoro estas la konata esploristo S-ro Tobor Sekelj, Kondina 24, Beograd, Jugoslavio. Administranto: Nina Vidervol Prazakova 12/II. I., Ljubljana, Jugoslavio. Abonprezo \$ 1.— (aŭ egalvaloro) Pagebla ĉe la Administra Oficejo de U.E.A.

* *

ESPERANTO *Tor zur Welt* estas la titolo de Katalogo, eldonita de la Limburger Vereinsdruckerei, Limburg Lahn, Diezerstr. 17—19, Germanujo. La Katalogo estas verkita en la germana lingvo kaj enhavas la titolojn de multaj esperantaj verkoj.

Preso kaj papero estas tre belaj kaj laŭ nia scio estas la unua fojo en la historio de nia lingvo ke granda eldonejo eldonis en nacia lingvo tian ampleksan katalogon pri esperantaj verkoj. Speciale la germana popolo havas nun la eblon konstati ke Esperanto havas literaturarojn laŭ ĉies gusto. Ni deziras al la eldonisto multan sukceson.

NORVEGA ESPERANTO — SLOSILO 3a el dono estas aperigita de la Eldonejo Esperanto A/S, Boks 942, Oslo. Prezo N.Kr. 0,75; 9 pencoj; Gld. 0,45. Mendebla ĉe Libro-Servo L.E.E.N. kaj aliaj.

Generale la konataj Ĉefeĉ-slosiloj kiuj aperis en multaj lingvoj estas elĉerpitaj kaj la novaj adeptoj de nia lingvo tute ne konas ĝin. Tial estas bona ideo de la nomita eldonejo de nove aperigi la novegan. La antaŭa aperis en 1934 kaj intertempe la norvega lingvo ekhavis novan ortografion kaj krome en Esperanto estas akceptitaj multaj novaj radikoj, tial la nuna eldono estas tute re vizitiota de S-ro R. Bugge/Paulsen, membro de la Akademio, kaj aprobita de la Serva Centro de U.E.A. en Genevo. Ni forte esperas ke la eldono havos bonan sukceson.

* *

ĈIRKAŬ LA NASKIGO DE MIA MISIO. Martinus. El la dana tradukis C. Graversen. La Spirit-sciencia Instituto de Martinus, Kopenhago, 1956. 60 p.; 12 x 19; bind.

Martinus ne ŝatas paroli pri si mem nek tiri ian vantajn gloron el la Dia revelacio kiun li spertis. Eĉ liaj spiritalaj vizioj, li diras, estus signifaj, se ili ne estus ebligintaj lin montri, ke la plej altaj veraĵoj de la vivo identas kun scienco, kun arto kaj amo. „Vivante laŭ miaj vortoj, ĉiu ekamos la Patron... ĉiujn kaj ĉion... kio estas ... la plej alta formo de la vivo, la plej intensa sento de ĝojo, la sperto de vera feliĉeco.“ Nur tial li sentis sin devigata paroli pri sia misio. Martinus tamen ne estas la tioma mondsavanto, kiu minacas ĉiujn skeptikulojn per la fulmoj de la Dia kolero. Li ne celas forlogi iun, kiu en sia religia kredo jam trovis feliĉon. Li tute ne predikas novan „kredon“. Se infano de la moderna epoko trapenetrata de scienca sinteno, bezonas pli ol nur kredon, bezonas scion pri la mondmistero, ĝi trovos la avidatan instruon en la spirita scienco de Martinus, kaj feliĉiĝos, se ĝi identigas kun ĝi sian propran vidadon.

Jen mallonge la mesaĝo de Martinus en ĉi tiu libreto, direktata al la „absolute senpartiaj verserĉantoj“, al kiuj la pura scienco estas sankta... kaj la sola reala bazo por iliaj rezonoj, juĝo kaj tuta agmaniero. Por detala pritraktado de sia spirita scienco, li resendas al sia ĉefverko „Livets Bog“. La Libro de Vivo.

Verketo tole bindita, zorge presita; la lingvo, kontrolita de la SAT-Literatura Komitato, estas neriproĉinda, se oni konsentas pri ĝia multe kritikata prefero por la TIOM-KIOM-esprimoj.

F. C.

U.N.E.S.C.O. - Novajoj

Studoj pri la publika opinio rilate eksterlandanoj.

Kio decidigas la starpunkton de ordinaraj homoj rilate eksterlandanojn kaj eksterlandajn kulturojn: ĉu la libroj, kiujn ili legis, aŭ la eksterlandanoj, kiujn ili renkontis, aŭ tio kion ili lernis en lernejoj, aŭ la personaj spertoj?

Por eltrovi tion, oni entreprenos testojn en kelkaj landoj de Okcidenta Eŭropo. La samaj demandoj estos faritaj al personoj apartenantaj al diversaj socitavoloj en ĉiu el la landoj kaj la respondoj estos komparitaj kaj analizitaj.

Tiu ĉi esplorplano, kiu estas parto de la programo de UNESKO koncerne la studon pri la kondiĉoj favorantaj internacian komprenigon kaj pacan kooperadon, estis diskutita de 20 sociologoj el 9 landoj dum kunveno organizita de UNESKO kaj okazinta inter la 26-a kaj 28-a de aprilo 1956.

La enketo komenciĝos en aŭtuno.

Azio en la lernolibroj de okcidentaj landoj.

Edukistoj el 16 landoj, kiuj kunvenis en la UNESKO-Domo en Parizo de la 2-a ĝis la 12-a de majo, kritikis la „ĝeneralan mankon de objektiveco” en la traktado de la azia civilizacio en la lernolibroj de okcidentaj landoj kaj en la instruado ĝenerale. La kunveno esploris la eblecojn kiel plibonigi la nunan staton. La edukistoj konkludis, ke la „instruistoj devas enigi en la mensojn de la infanoj la unuecon kaj kontinuecon de la monda civilizacio.” Ili precipe akcentis la bezonon emfazi la kontribuon de la aziaj popoloj al la mondocivilizacio; pli vivecan kaj realan prezenton de la azia vivkonceptado precipe rilate familion, nutraĵon, edukadon, arĥitekturon, literaturon k.s.

Bulgarujo fariĝis membro de UNESKO.

Post la aliĝo de Bulgarujo al UNESKO, nun tiu organizaĵo havas 75 membrojn. La 17-an de majo Bulgarujo deponis ĉe Foreign Office en Londono siajn instrumentojn pri la akcepto de la Konstitucio de UNESKO.

Hungarujo ratifas la Konvencion pri protekto de la kultura proprieto.

La 17-an de majo 1956 ankaŭ Hungarujo ratifas la Internacian Konvencion pri la Protekto de Kultura Proprieto en kazo de armata konflikto. Antaŭ tio jam ratifis la Konvencion Egiptujo, San Marino, Burmo, Jugoslavio kaj Meksiko.

Popoloj kantoj de Eŭropo.

En la mondo ĉiam pli kaj pli kres-

LISTO DE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ

Antverpeno

„In 't Duifken” (S-ano Paesmans), Lge Koepoortstr. 64: Kostumoj (5 0/0 rab.)
Vino Max Bolsius, Diepestraat 58-60, Antverpeno: Kuirejilaro. Tel. 32.57.85
P. Philips, Karel Rogierstr. 1, Antverpeno. Korsetoj - Rab. 5-10% por la membroj.
P. van der Hoydonck-van den Buys, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg.
 ŝuoj — Teksaĵoj — Merceraĵoj. Tel. 74.27.86
J. Montmirail, Kortemarktstraat 53, Berchem. Arĥitekto. Tel. 39.58.66
Morris de Ketelaere, Oostenstraat 25, Antverpeno. Hemiaĵoj. Tel. 39.17.09
S-ino Henny Jacques-de Ketelaere, Beeldekenstr. 31, Antverpeno. Gramofonaj diskoj por meminstruado. Tel. 33.75.38
Roger Jaumotte, Cyriel Buyssestr. 44, Antv. Anoncoj en tagjurnaloj. Tel. 37.47.14
K. Amerijckx, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Hejtado. Tel. 45.81.07
R. De Soete-Vanistendael, Dambruggestraat 234, Antv. Okulvitroj — Rab. 5 0/0
CL. Peeters, Onderwijsstraat 68, Antverpeno. Apotekejo. Tel. 35.40.67
L. Van Reybrouck, Venusstraat 33, Antverpeno: ĉiusp. iloj por la hejmo. Tel. 32.43.88
Firmo van Iseghem & Verstraeten, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken.
 Vitraĵoj — Speguloj — Tel. 37.88.20
J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Viandisto. Tel. 39.55.81
H. Peeters, Vordensteistr. 58, Schoten. Ingen.: Neon-lumo, Reklamoj. T. 81.48.47
H. Jacques, Lange Beeldekenstraat 31, Antverpeno. Presaĵoj. Tel. 33.75.38
Verdijck, St. Rochusstraat 174, Deurne. Ĉiaj asekuroj kaj hipotekoj. Tel. 39.06.07
P. Peelman, Volkstraat 34, Antverpeno. Fumaĵoj — Pantofloj. Tel. 37.62.55
Y. Ameryckx, Helmstraat 154, Borgerhout. Peltaĵoj
M. Blajwas, Simonsstraat 40, Antverpeno. Frizisto. Tel. 32.13.18
A. van den Neste, Deurnebaant 30, Merksem. Presad-inkoj. Tel. 45.78.59

Brugo

Marcel Poupeye, Elf Julistr. 31. Ĉiaj asekuroj en la tuta lando. Tel. 371.93
Charcuterie Strove, Vlamingstr. 48 (Teatroplaco) Viandvaroj. Tel. 334.08
Maison Joye, Gelmuntstr. 29. Cemizoj, Gantoj, Kravatoj. Tel. 332.75
Firmo G. Verbeke, spinolarei 19: Konstrumaterialoj. Specialaĵo: naturŝtono de Jura. Tel. 321.85
Pan- kaj Kukbakisto R. ROSSEEL, Mariastraat 30, Konsumsalono. Tel. 338.34

Bruselo

Farmaciisto Jacobs, 94, rue général Eenens Bruxelles 3 15.26.01
Farmaciisto N. Nellis, Meise 59.13.73
„BONBONS SWINNE”, 77, rue de Nieuwenhove 44.57.36
Imprimerie Lielens, 18, rue de la Princesse 21.10.98
CARRELAGE „Carrart”, 19, avenue de Saxe 21.74.49
Viaĝi MEBLOJN ĉe S-ro Weyn, aĉetu rue Destouvelles, 57 15.96.97
Libroj, Publikajoj, ĵurnaloj, F-ino Kestens 24, rue Bodenbroeck 11.71.03
Tinkturejo, senmakuligejo „TEX” 11, Av. du Couronnement,
 Woluwe St. Lambert 70.75.82

KOMERCISTOJ kiuj senkoste propagandas por Esperanto per reklamoj en siaj butikoj

G. Baeten, Belpairestraat 53, Berchem. Tel. 39.22.81. Frizisto por sinjorinoj
„De Boerinekens” (Clem. Van Hassel). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo
A. Roels, Montignystraat 155, Antverpeno. Ledaj artikloj-Selisto. Tel. 37.14.07
G. Goemaere, P. Genardstraat 39, Antverpeno. Speciejo, laktejo
Vandersmissen, Kamploenstr. 11, Antverpeno. Paperaĵoj, parfumaĵoj
Van Kerckhoven, Grote steenweg 63, Berchem. Fornoj; forĝaĵoj
R. Scheerdijk, Oude Vaartplaats 34, Antverpeno. Ŝnuroj; lignaj ŝuoj; lanternoj ĝardenilaro
Butiko Angora, (galerio), Huidevettersstr. Antverpeno. Luksaj pantofloj, sportŝuoj
Librejo Schuttershof, Schuttershofstr. 36, Antv.: luo, aĉeto, vendo de libroj
Vojaĝ-agentejo Pier Busseti, Hopland 5, Antv.: privataj kaj grupvojaĝoj

kas interesiĝo pri popolaj kantoj. Nun la Internacia Konsilantaro por Popola Muziko kompilis Antilogion de 183 kantoj el 30 eŭropaj landoj. La kantoj estis elektitaj post konsultigo kun specialistoj pri popola muziko en diversaj landoj. Oni precipe atentis al tio, ke la kantoj estu nepre originale popolaj, trasmetitaj al la nuntempo buŝe de unu generacio al la alia. La melodioj estas prezentitaj en la

tradicia maniero sen instrumenta akompano, kaj la tekstoj estas donitaj en la originalaj lingvoj kun samtempa angla traduko.

(Laŭ Unesco-Features)

Drukkerij Krol, Hoofdstaat 29, telefoon 105, Uithuizen (Nederland)